

Annette von Droste-Hülshoff,	Annette von Droste-Hülshoff,	Annette von Droste-Hülshoff,	Annette von Droste-Hülshoff,
Lastaj vortoj	Letzte Worte	Lastaj vortoj (0)	Lastaj vortoj (2)
<i>tradukita de Joseph Ferdinand Berger</i>		<i>tradukita de Manfred Retzlaff</i>	<i>tradukita de Manfred Retzlaff</i>
		<i>Laŭvorta Esperantigo</i>	<i>2a versio</i>
Amatoj, kiam min forlasis spirit', ne ploru do pro mi! Por paca ekzistad' min kaŝis en brila tag' la bona Di'.	Geliebte, wenn mein Geist geschieden, So weint mir keine Träne nach; Denn wo ich weile, dort ist Frieden, Dort leuchtet mir ein ew'ger Tag.	Amatoj, kiam forpasis mia spirito, ne postploru min per iu larmo; ĉar tie, kie mi restadas, tie estas paco, tie lumas al mi eterna tago.	Karuloj, kiam pasis mia Spirit', pri mi ne ploru vi; Ĉar lumas jen en paco Dia Eterna tago ja al mi.
Ne estas plu ĉagreno tera. Eternas via bild' ĉe mi. Mi petos pri balzamo vera por vundoj kaj dolor' de vi.	Wo aller Erdengram verschwunden, Soll euer Bild mir nicht vergehn, Und Linderung für eure Wunden, Für euern Schmerz will ich erlehn.	Tie, kie ĉiu ter-aflikto estas malaperinta, ne foriĝu via bildo al mi, kaj mildigon por viaj vundoj, por via doloro volas mi elpetegi.	En tiu senaflikta foro Memoru daŭre mi pri vi, Por viaj vundoj kaj doloro Mildigon volas peti mi.
Se svingas Pac' en nokta ombro Seraffugilojn super Ter', ne pensu plu pri mia tombo! Salutas mi el stela sfer'.	Weht nächtlich seine Seraphsflügel Der Friede übers Weltenreich, So denkt nicht mehr an meinen Hügel, Denn von den Sternen grüß' ich euch!	Se dum la nokto blove svingas siajn seraf-flugilojn la paco super la mondoregnon, ne pensu tiam plu pri mia tombo, ĉar el la stela spaco mi salutas vin.	Se venas kun flugilo sia La nokta paco al la Ter', Ne pensu plu pri tombo mia, Salutas mi el stela sfer'.
...

Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de JOSEPH FERDINAND BERGER (*1894-10-07 - †1976-03-28) en 1958.

Arg-160-467 (2009-11-22 09:37:58)

Tiu ĉi traduko de la poemo estas unue publikigita en 1958, ĝi aperis en la Esperantorevuo "Norda Prismo", n-ro 58/2, sur paĝo 74. Vidu ankaŭ la ttt-ejon "<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Lit/Retzlaff/Re-vuoj/np/np5802/lastaj.html>"

Frau Dr. Edda Baußmann, wissenschaftliche Mitarbeiterin der Droste-Gesellschaft (Am Rüschaus 81, D-48161 Münster, baussmann@droste-gesellschaft.de - www.droste-gesellschaft.de) ferschriftlich mitgeteilt worden.

Pri Joseph Ferdinand Berger rigardu ankaŭ la retejon http://wapedia.mobi/eo/Joseph_Ferdinand_Berger#2.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24).

Arg-160-315 (2004-05-27 10:56:26)

Dies Gedicht ist jedoch nach neueren wissenschaftlichen Erkenntnissen nicht von der Dichterin selbst verfasst worden, sondern, nachdem Annette verstorben war, von deren Nichte Elisabeth von Droste-Hülshoff (1845 - 1912). Man hat es aber bisher der Annette von Droste-Hülshoff zugeschrieben. Dies ist am 6. Februar 2003 von Frau Dr. Edda Baußmann, wissenschaftliche Mitarbeiterin der Droste-Gesellschaft (Am Rüschaus 81, D-48161 Münster, baussmann@droste-gesellschaft.de - www.droste-gesellschaft.de) ferschriftlich mitgeteilt worden.

Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2004-05-16.

Arg-160-475 (2004-05-16 17:17:06)

Proksimuma laŭvorta Esperantigo de la origina germana-lingva teksto

Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 - †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2004-05-16.

MR-311-5 / Arg-160-474 (2004-05-16 13:52:23)

La trian strofon mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis iom laŭ la modelo de la traduko de Josph Ferdinand Berger, uzante ankaŭ la rimvortparon "Ter' - sfer". En mia unua traduko-provo de l' 26.08.1997 resp. de l' 15.05.2004 mi iom tro ofte uzis la rimvortojn "mi, vi, ĉi". Tio certe ne estas tre bona solvo kaj efikas iom ĝena.